H. de Kersgieter.

„PACO KAJ JUSTECO"
3-a jaro - Nº 8
MEDEDEELINGEN VOOR DE LEDEN
Julio 1944

La PSIKOLOGIO DE LA MURDO.- (I-a daŭrigo)
II.- Difinoj kaj orientigo.

"Murdo" signas specon de malpermesata hommortigo; do neniel temas pri la faro de soldato dum milito, de ekzekutisto en sia ofico, de persono en kazo de leĝa memdefendo.

Ĝi estas diverse - sendube pli en la praktiko ol laŭ la leĝolibro - atenoi ies vivon: la autoro de akcidento plenumas tion pro manko de singardo kaj jen nevola hommortigo (punjura kodo, art.418-419, okaze de trajnakcidento, art.423); oni batas kaj vundas iun, kaŭzas ties morton, kvankam ĉi rezulto ne estis celata, kaj jen la misfaro de art.401; oni ankaŭ povas mortigi kun la intenco mortigi kaj jen mortbato (doodslag, art.393); se antaŭmedito akompanas tiun mortbaton, ni akuzos pri murdo (moord, art.394).

Certaj cirkonstancoj eventuale pligravigas ĝin, kaj igas ĝin respektive patromurdo (art.395), infanmurdo (art.396), venenigo, (art.397). En tiu rubriko ni aldone menciu la abortigon (art.348 - 353) -- estaĵo morgaŭa, ja vivanta, tiam estas la viktimo --, la mortigon dum duelo (art.430) k.t.p.

Fakte, kiel la titolo montras, ni principe atentas nur la murdon; la mortbato kun la intenco atingi tiun sekvon kaj kiun plie pripensita krima intenco antaŭas. Nia esplora kampo, nun jam tre klare limigita, ankoraŭ pli malvastiĝas, tial ke nur la normalaj kazoj, do ne la patologiaj, estos pritraktataj, kvankam la teorio ankaŭ aplikiĝas al tiuj ĉi; ni do ekskludas la murdojn kie nekutimaj kaj morbaj (ziekelijk, morbide) procesoj disvolviĝis en la konduto de la krimulo.

La dirita normala murdo estas pristudata el la vidpunkto de la psikologo. Estas notinde ke tiu aspekto, kiel interesa ajn, estis ja tute neglektata tiel ke la suprajaj kaj nekompletaj konceptoj de Darwin, Lombroso kaj aliaj antropologoj restis en modo, kvankam ili ne konsideris la veran, efektive esencan flankon, nome la internan sintenon de la krimulo kaj la rilatojn de lia ago kun lia morala personeco. La kono tiel akirita riveliĝis dangera fragmenta kaj skema kaj neniel akordigebla kun la kompleksa realo: la krimulo ne estas reduktebla al senkarnaj kaj ĉiam identaj tipoj, kiaj unuflanke la okaza (normala), aliflanke la instinkta (au denaskiĝa, do tute neresponda), precipe kiam ĉi lasta ĉefe baziĝas sur ecoj eksteraj, fizikaj, el kiuj la animo estas for; kontraŭe, li restas homo, individuo kiu indas kaj nepre postulas ke oni konsideru lian sintenon en la reala medio, la medio de la interna vivo, en la lumo de lia tuta personeco. Dro. Profesoro F. De Greeff, kiu cetere verkis la tezon pri la psika ekspliko de la murdo kaj de kiu ni pruntis ĝin (I), trafe vertigas tiun en sia "Introduction à la Criminologie"(2);

"...oni tre forgesas ke la krimulo antaŭ ĉio estas homa estaĵo kiu multe pli similas la aliajn ol li diferas de ili, ke li ne estas pasiva objekto, senkonscia automato, svingata de la heredeco, de la endokrinologio, de la sociaj cirkonstancoj kaj movata al la krimo same kiel la mekanika serpento de Vaucanson."

"Kiel la aliaj homoj, la krimulo konstruas sian vivon, direktas ĝin, eraras, korektas, ekzaltiĝas kaj suferas; kiel la aliaj homoj li ne konscias la sekretajn influojn de faktoroj pli malpli morbaj sur liaj inklinoj; liaj decidoj kaj agoj reprezentas, kiel tiuj de la aliaj homoj, kion li povis fari plej bona en donitaj cirkonstancoj."

"La historio de lia krimo, de lia vivo, estas antaŭ ĉio homa verko. Kaj ni ne estos realo progresintaj, tiel longe ke, limigante nin ĉe denombrado de la kaŭzoj kiuj agas, ni ne estos kapablintaj refari per ĉiu tiu disa materialo, psikologian tuton, stabilan kaj akceptebLan, rekonstruon de la reala mensa vivo de la subjekto."

Tiu "remunto" de la animoprocesoj kiuj kondukas al la krimo ne toleras studon en la absoluto; la metodo estos do specife komparа.

Ĝenerale, la nura fruktodona laboro konsistos en la kompara de la fizika ka. psika personeco de deliktulo kun tiu de honesta homo, pleje samspeca, rilate la medion, la intelekton, la moralan komprenon, la edukon, la regionon, kaj eĉ la heredon kaj difektojn. Speciale, koncerne la murdon, oni notu ĝian similecon al ago grava, t.e. ago kiu modifas la ekzistadon, riskigas la estontecon, la kontraŭo de ago ĉiutaga, banala. Longa psika evoluo (ne aŭ malbone konata de la subjekto) karakterizas ĝin kaj ĝi obeas fundamentajn leĝojn; cetere, ĝia manko markos la murdon je nuanco ekster-norma, la foresto de morala lukto, de adaptiĝo pro ekzemple abrupta emocia naskiĝo de la ago aŭ konscienco plene sensentigita (kutimiĝo aŭ morala degeneriĝo)(3) kaj tiajn krimulojn la tezo ne ampleksas. Kiel tipan agon gravan, kies evoluado similas tiun de murdo, Dro. T. De Greeff elektis la konvertiĝon ĉe la civilizotoj kaj li ilustris ĝin per la priskribo de R. Allier en la "Psychologie de la conversion chez les précivilisés"(4).

III.- La ago grava tipa: la konvertiĝo.

La konvertiĝo ne estis prenata kiel ago tipa grava sen motivoj: ĝi estas unue bone observita fenomeno, pri kiu la informoj estas abundaj kaj kredindaj, kaj ĝi estas due, se oni rilatigas ĝin kun la indiĝenaj kadro kaj vivo, grandparte kontrausocia (kiel la krimo mem).

La venonta konvertito iĝas loko kie diversaj procesoj malvolvas sin, kiuj movas al konvertiĝo aŭ almenaŭ ebligas ĝin; same homo estos neperceptoble konduksta al la murdo. R. Allier distingas tri stadiojn en tiu evoluado; estas kompreneblo ke tiuj tranĉoj estas nur principaj -- ili valoras nur montrofostetojn kaj oni ne povas tro strikte sekvi ilin. Konsento senefika kaj konsento formulita signas la finiĝon de la unua kaj de la dua periodo; ili atingas kulminon en la tria, la krizo.

par.1.- La konsento senefika.-

Ĉe la establo de misiono, la indiĝenoj agnoskas, post iom da tempo kaj almenaŭ vorte, ke la misionulo pravas, ke ilia vivo estas malsupera. Sed estas ĉio: nenia efektiva modifo montras aktualan inklinon al konvertiĝo -- kaj tio dauros eble jarojn.

Certe ekzistas konsento, tamen ĝi enhavas precipe afablon, deziron gajni avantaĝojn de la misionulo, kaj la teoria aliĝo signifas fakte nur komplimenton... Por ni ekzistas okulkreva kontraŭeco: "la agoj sekvu la akordiĝon de la spirito!"; en la kapo de la pagano novaj elementoj simple apudiĝis al la jam ekzistantaj, la komparo inter ili ne estas farata tiel longe ke la kerno ne sufiĉe fortiĝis. Ĉu ne same okazas ekz. la aĉeto de aŭtomobilo ? Konversoj, reklamoj, akcidentoj k.t.p. konvinkas pri la avantaĝoj de la veturilo, sed la aĉeto ne estas decidata; la pripenso eble iĝos deziro... kaj tiam la akiro ŝajnos memkomprenebla! Estas cetere ĉ feliĉe ke la kompara venas malfrue, ĉar se la pagano (aŭ la amatoro de aŭtomobilo) komence elektus, la nova kerno sendube ne venkus...

La konsento senefika estas do io nova en la konscienco, la subjekto ne opinias ĝin grava kaj ĉio okazas senkonscie; tiu konsento eĉ ne rivelas al li la recentan tendencon, kvankam tamga observanto jam tiumomente povus auguri la finon.

Resume: neniu ŝanĝiĝo montras la progreson de la nova ideo, la socia konduto de la individuo restas identa sed diferaj elementoj malrapide invadas la pensokampon en simpla apudiĝo.

par.2.- Konsento formulita.-

Dank' al la manko de kontraŭstaro la nova ideo konkeras terenon, sed same -- kvankam la demando pri aliĝo neniam estas klare esprimata -- la subjekto ekvidas la konsekvencojn de la akcepto kaj i.a. ĝiajn eventualajn malfacilaĵojn. Krome, ĉar la konscienco antaŭsentas la finiĝon de sia kvieto, surda (preskaŭ nekonscia) rezisto estiĝas. Ambaŭ, progreso kaj rezisto, kreas iom post iom la elementojn de projekto: "mi devus konvertiĝi". Tie la konsento, ankoraŭ kondiĉa, eniras la konscion.

La konsento, ĝis nun abstrakta, fariĝas pli afekcia kaj same la ĝena flanko prezentiĝas al la spirito de la interesato: konvertiĝi estas ago grava, ĝi estas ribelo kontraŭ la socia korpuso tiel ke la decida paŝo ŝajnas preskaŭ heroaĵo, la koncepto de la subjekto mem pri la socia stato estas fakte

tabua (sankcioj de la ĉefo, de la senaj moralaj ŝangoj ludas rolon.

La impulso al konvertiĝo do de helpojn kaj la rezisto organiziĝas ĝo povas halti. Sed se la konsento jekto ĝenerale prokrastos la afer solvo dependas de li sed li espera tigi sin li uzas ekvivalentojn, ek ti la bapton ser pli - aŭ erigi la nur adultante) - aŭ konvertigi la edzinojn k.t.p. Komence tio ne ĉia antaumeditita, sed se ĝi estas val dio (fariĝas "obstiniĝo", kaj sin nun la indiĝeno reagas, ekz. edzi au li decidos suriri la novan vojo vidos poste.

Se la konvertigo malgrau ĉio pl fidas al la okazaĵoj, la hazardo, kreita de la cirkonstancoj kaj ke

---

(1) La Psychologie de l'Assassinat gie 1935, févr. p.153 et s., a
(2) 1937, 362 p. Collection des co sciences criminelles de l'Univ éd. "L'écrou", p. 7-8.
(3) La problemoj de la respondeco, ne estas rekte ekzamenataj, se
(4) Payot, Paris, 2 vol.

II. LA HISTORIO DE LA

La moderna movado ne deŝiris la ĉiuj ventegoj: purigi la aeron. Gi konduki ĝis florado neniam konitan ilian programon; la pasio ofte esti to de la amaso restis malinklina ka satana sendieco, ilia akra mordanta ilia egoismo kaj sinmendigo; Ili kaj moko, kaj ili agis, kvazaŭ nur donu ĉe tio: I) la realistan nature vis la motivojn en tio, ke la homoj kompreneblecon: "zoo'n muzikaal ges roanarĥio, kaj malŝato de vortaroj tis amuzon, sed iĝis penado. Kion p taan voelden in 't geel, in 't brui

Sed ni ne povas bei la grandajn arton al multaj verkistoj. Per atak portis la arton sur la bela vera vo animpoezio atingis ofte mirindajn b vo puriĝis, riĉiĝis, subtiliĝis. La propra kaj franca literaturo. La pl la stilo, la pura vortbeleco, la tu syn, iĝis la nederlanda lingvo per la vortarto. Venis Europea vasteco sian vorton en la mondliteraturo.

Noto: apud la moderna movado, sed s verkistoj rakontis, kie la Modernul ĉiujn detalojn, ili donis sole la t oni jam povis rimarki tian movadon estas unua celo ĉe Haspels, Van Dor is ĉe Van Schendel, Aart van der L

Fontoj:
"Beknopte Geschiedenis der Nederl

tabua (sankcioj de la ĉefo, de la medio kontribuas al tio), kaj fine la personaj moralaj ŝanĝoj ludas rolon.

La impulso al konvertiĝo do daŭras, sed la subjekto vides antaŭ la malhelpojn kaj la rezisto organiziĝas kaj tie jam - kiel antaŭe - la konvertiĝo povas halti. Sed se la konsento esprimiĝas, la ago ne tuj sekvas; la subjekto ĝenerale prokrastos la aferon (de pli malfrua obeo), li sentas ke la solvo dependas de li sed li esperas ke poste ĉio plifaciligos kaj por kvietigi sin li uzas ekvivalentojn, ekz. esprimi la intencon konvertiĝi kaj peti la bapton sen pli - aŭ erigi la ŝanĝon (fari preĝojn, ritojn, peki sed nur adultante) - aŭ konvertigi la edzinon kaj infanojn - aŭ forsendi kelkajn edzinojn k.t.p. Komence tio ne ĉiam estas ruzo, kalkulo, tiu teniĝo ne estas antaŭmeditita, sed se ĝi estas velata, la pagano aŭ persistos en sia komedio (fariĝas "obstiniĝo", kaj situacio tute difera de la ekvivalentoj, ĉar nun la indiĝeno reagas, ekz. edziniĝante duan virinon laŭ la pagana rito) aŭ li decidos suriri la novan vojon, kaj subite komenciĝos la krizo, kiel ni vidos poste.

Se la konvertigo malgraŭ ĉio progresas, oni ofte observas ke la subjekto fidas al la okazaĵoj, la hazardo, esperante ke senelireja situacio estos kreita de la cirkonstancoj kaj ke lia regreso estos malebligita.

K.M. (daŭrigota)

(I) La Psychologie de l'Assassinat - Revue de droit pénal et de Criminologie 1935, févr. p.153 et s., mars p.313 et s., avril p.375 et s.
(2) 1937, 362 p. Collection des controverses criminologiques de l'Ecole des sciences criminelles de l'Université de Louvain, volume hors-série n°I, éd. "L'écrou", p. 7-8.
(3) La problemoj de la respondeco, de la morala kaj parencaj demandoj tie ne estas rekte ekzamenataj, sed pro tio neniel neataj.
(4) Payot, Paris, 2 vol.

EL LA HISTORIO DE LA NEDERLANDA LITERATURO (2-a daŭrigo kaj fino)

La moderna movado ne deŝiris la fruktojn kiujn ĝi esperis. Ĝi laboris kiel ĉiuj ventegoj: purigi la aeron. Ĝia celo estis revivigi la vortarton kaj ĝin konduki ĝis florado neniam konitan en Nederlando. La Modernuloj ne plenigis ilian programon; la pasio ofte estis tro ega al la celo. La plej granda parto de la amaso restis malinklina kaj malkonfida. La kaŭzo estis unue ilia satana sendieco, ilia akra mordanta lingvo, ilia troigo, aroganta fiereco, ilia egoismo kaj sinmendiigo; Ili traktis pri la malnovaj poetoj kun malŝato kaj moko, kaj ili agis, kvazaŭ nur ili mem malkovris la veran artideon. Aldonu ĉe tio: I) la realistan naturalecon de iliaj verkoj, por tiuj ili trovis la motivojn en tio, ke la homoj sentis nemorale kaj malĉaste; 2) la nekompreneblecon: "zoo'n muzikaal gestotter en gestamer" kiu kondukis al lingvoanarĥio, kaj malŝato de vortaroj kaj gramatikoj; 3) la legaĵon, kiu ne restis amuzon, sed iĝis penado. Kion povis senti la homoj por: "heeren, die voortaan voelden in 't geel, in 't bruin, in blauw, in 't groen" ? (J.Persyn)

Sed ni ne povas bei la grandajn meritojn de la movado, aŭ rifuzi grandan arton al multaj verkistoj. Per atakado de la retoriko en la poezio, ili reportis la arton sur la bela vera vojo kiu kondukis al naturo kaj vereco. La animpoezio atingis ofte mirindajn belaĵojn de formo, ritmo kaj sono. La lingvo puriĝis, riĉiĝis, subtiliĝis. La atento iris al la grandaj majstroj de propra kaj franca literaturo. La plej granda merito de tia periodo estas en la stilo, la pura vortbeleco, la tualeto de la literaturo. Laŭ Dro. J. Persyn, iĝis la nederlanda lingvo per la klopodo de la Modernuloj mira ilo de la vortarto. Venis Europea vasteco en nia literaturo kiu de nun povis diri sian vorton en la mondliteraturo.

Noto: Apud la moderna movado, sed sub ĝia influo, venis Neo-Romantismo. Tiuj verkistoj rakontis, kie la Modernuloj ĉirkaŭskribis; kie la Modernuloj donis ĉiujn detalojn, ili donis sole la tipikan, kaj lasis la reston por la imago. Oni jam povis rimarki tian movadon ĉe Van Hulzen, Van Looy, Heyermans,; ĝi estas unua celo ĉe Haspels, Van Oordt, Nico van Suchtelen, kaj ĝi totale venis ĉe Van Schendel, Aart van der Leeuw, Boutens, Smulders kaj Marie Koenen.

(verkis por la revuo - A. Claeys.)

Fontoj:
"Beknopte Geschiedenis der Nederlandsche Leeterkunde" de W.Van Neylen kaj N. van den Dries.

- "Voorrede op de "Mathilde cyclus" van J. Perk. " de W. Kloos.
- "Voorrede op de "Mathilde cyclus" van J. Perk de Vosmaer.
- "Kritiek op de voorrede van Vosmaer" de W. Kloos.
- "Veertien jaar literatuurgeschiedenis" de W. Kloos.
- "Zuid en Noord II" (II-a eldono) de E. Baunenes S.J.
- "Zuid en Noord II" (I3-a eldono) de E.Baunenes S.J.
"Zuid en Noord, poŝsis (IO-a eldono).
- "Lovado pri la historio de la nederlanda literaturo", de Br.Godfried (Xav.)

XXXXXXXXXXXXXXXX

ONS STUDIEHOEKJE : - Het gebruik van Tiu, Tio, Tia
en van Kiu, Kio, Kia.

De overigens zeer verdienstelijke ceeh-methode lost deze moeilijkheid van af de eerste les op. En ze doet dat op de haar eigene treffende manier.

De leeraar presenteert aan het auditorium zijn naamkaartje en zegt dan: Mi estas (bvb.) Tiberio Morariu. Onmiddelijk daarop schrijft hij op het bord "Kiu estas mi ? Mi estas Tiberio Morariu." En aanstonds heeft ieder begrepen dat hij vroeg: wie ben ik ? Ik ben Tiberio Morariu.

Daarop maakt hij de cursisten bekend dat hij leeraar is. Hij gaat naar het bord en schrijft; "Kio estas mi ? Mi estas instruisto." daarbij zorgvuldig de O van kio en instruisto onderlijnend. En aanstonds heeft ieder begrepen dat hij vroeg: "Wat ben ik ? Ik ben een leeraar." Nadat hij aan enkelen gevraagd heeft "Kio estas vi ?" en deze hun beroep opgegeven hebben aan den helper-vertaler, vraagt hij dan plots weer:"Kiu estas vi ?" en als deze nu ook zijn beroep opgeeft, verwekt het hilariteit onder diegene die vlug zyn van geest en dan reactie, want zij hebben aanstonds gevat dat hier weer diende de naam gezegd te worden. De beteekenis van "kia" wordt dan op de volgende wijze verduidelijkt. De leeraar gaat bvb. naar de muur, glijdt er met zijn hand over de hoogte in, strekt zich uit en zegt:"La muro estas alta". Waar 't bord, en nu schrijft hij "kia estas la muro ? La muro estas alta." waarbij hij weer de A van kia en alta onderlijnt. Weer heeft ieder begrepen dat de vraag op het bord beteekende: "hoe is de muur ? De muur is hoog". Tot zoover de verdienstelijke ceeh-methode.

Geeft men echter korten tijd nadien aan die zelfde cursisten een thema waarin te vertalen is bvb. "welke onderwijzer ?" of "dit boek" dan zijn de gevallen legio waarin vertaald wordt: "kio instruisto?" en "tio libro". Dat bewijst dat een meer theoretische uiteenzetting ook nog noodig is. Deze uiteenzetting is overigens zeer eenvoudig en kan dus zeer kort zijn.

I) Tiu, tio en tia zijn alle drie aanwijzende woorden. Als naast het nederlandsche aanwijzende woord een zelfstandig naamwoord staat -bvb. dit boek, deze onderwijzer) moogt ge in vertaling nooit tio bezigen omdat dit woord een onbepaald aanwijzend woord is. Dit woord staat dus altijd alleen. Het beteekent:"dat" zonder meer. Ge hebt dus nog te kizen tusschen tiu en tia. Welnu waar het woordje tiu alleen maar aanwijst, vermeldt het woord tia ook nog de hoedanigheid van het aangewezene. Kia beteekent: "zoo een" t.t.z. met die of die kwaliteit.

Dus: tiu libro = dit boek; tia libro = zoo een boek.
tiu instruisto = deze onderwijzer; tia instruisto = zoo een onderwyzer

2) Volstrekt hetzelfde geldt voor de andere kleine woordjes eindigend op u of a of o.

Kio beteekent alleen "wat" ? zonder meer.
Kiu libro ? = welk boek ? (dit of dat boek daar)
Kia libro ? = welk soort boek ? (een roman, een wetenschappelijk werk)

3) Het kan nu wel gebeuren dat ge in een Esperantotekst de aanwijzende woorden tiu en tia toch alleen ziet staan. In dat geval is de aangewezene zelfstandigheid verzwegen of doch onderverstaan. Volgend voorbeeld kan helpen dit alles nog duidelijker te maken.

- Filo: tiu regularo estas severa.
- Zoon: dit reglement is streng.
- Patro: tio estas eduka.
Vader: dat is opvoedend (dat er een streng reglement is)
- Patro: tiu estas eduka.
Vader: dat is opvoedend (nml. dit reglement is opvoedend)
- Patro: tia estas eduka.

Sed nia grupo "Paco kaj Justeco" kiu per sia dummilita agado (neniu alia grupo funkcias) multon faris por nia ideo, meritas havi gvidantan lokon en la Esperanto-movado de nia lando; do, gemembroj estu fieregaj pri via grupo.

4°- Por rememorigi la pli interesajn okazintaĵojn el nia grupo-vivado, la estraro decidis konfidi al iu estrarano la redaktadon de ĉiumonata rubriko en la revuo pri "Nia grupa vivado". Ludgvidanto Roger Martens prizorgos tiun ĉi rubrikon. Ĉiu interni faru do laŭvice laborkunvenan raporton laŭ peto de la rubrikprizorganto.

Krom tiuj punktoj, oni priparolis ankoraŭ multajn aliajn, i.a. pri nova teksto por tradukado, pri nova aranĝo de la laborvesperoj k.t.p. punktojn.

Ni bonvenigas en nia grupo la du novajn membrinojn Erna Groeve kaj Germaine Lallet. Ni ĉiuj ege esperas ke ili iĝu fervoraj kaj idealistaj Esperantistinoj.

(Prizorganto: Roger Martens)

HOEKJE VAN DE POEZIE : - (ingezonden door een onzer leden)

Ik wil als een lachende toren in Vlaanderen staan,
en zingen hoog boven de velden het vroolijke lied;
van de vreugd' om mijn zonnige land, dat het gaint langs (de baan,
en mijn volk van de bloemen de levende kleuren weer ziet.

'k Wil zingen als d'honderden klokken van 't lieflijk land;
dat de wouden weer geuren als tuilen, de luchten weer blauwe
festoenen van bloemen weer bloeien als ragfijne kant;
en de harten vol liefde weer minnen onz' welige gouwen.

O, lachende klokken van Vlaanderens zingende torens,
ge voelt niet het koord dat langs muren nu schrijnende wrijft
Ge kent enkel den heiligen zang als van machtige koren,
en weet niets van de wolken vol storm die de wind nu opdrijft

(Kio Tedat)

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ : -

Pro manko da loko en la hodiaŭa numero la redakcio ne publikigas enigmon Cetere, la prizorganto de la rubriko, nia sekretario, ne scias ĉu daŭrigi, ĉu ĉesi la aperadon de ĉiuspecaj enigmoj en la revuo. Tro malmulte da gemembroj ensendas solvon (la kvin lastaj monatoj nur foje 2, dufoje I kaj dufoj neniu ensendis. Kompreneble nia sekretario ne ŝatas perdi horoj kaj horojn dum serĉado al novaj enigmoj se la gemembroj - por kiuj fakte li faras tiun malfacilan taskon -b ne montras emon, ja eĉ ne rigardas la rubrikon.

Nur la gefratoj C. kaj J. Callewaert meritas gratulojn dum la lastaj monatoj.

KIEL ONI GIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ? -

- Por malsaĝulo bastono, por saĝul' leciono - (Wie zich aan een ander spiegelt, spiegelt zich zacht)
- Donaci ovon por ricevi bovon - (een spiering uitgooien om een kabeljauw te vangen).
- Trafi la kernon de la afero - (de spijker op de kop slaan)
- Parolo estas arĝento, oron similas silento. - (Spreken is zilver, zwijgen is goud).
- Tro akra fajro estas sen daŭro - (Men moet nooit te hard van
- Kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas - stapel loopen).
- Akvo trankvila estas akvo dangera - (stille waters hebben diepe gronden)
- Ĉiu sezono laŭ sia bono - (Alles op zijn tijd)
- Tempo venos, zorgon prenos - (Komt tijd, komt raad)
- Tio estas certaĵo kaj leĝo kiel amen en preĝo - (dat is zoo vast als 2x2
- Kelktempa ĉeso ne estas forgeso - (Uitstel is geen afstel)
- Ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava - (Kleine oorzaken hebben groote gevolgen)
- Kiu nenion valoras plej multe sin gloras - (Holle vaten klinken het hard

XXXXXXXXXXXXXXXX